

V-19479/42 (1973)

Bulgaria

ESPERANTISTO



* * *	La paco — afero de ĉiuj kaj de ĉiu!	1
	Nano Nanov, Kunĉo Vălev. Granda esperantista evento . .	2
* * *	Premioj de la Recitalo	4
	Vera Vâjarova. Celebro de esperantisto-veterano	5
	Krâstju Karucin. Honorplena 90-jariĝo	6
* * *	El la rememoroj de Stefan Minkov	7
	Veselin Nikolov. Vespero de la internacia amikeco	9
	Jordan Kazakov. Pupoj parolas en Esperanto	9
	Rosica Georgieva. Sindona agado de Esperanto-veterano . .	10
	Georgi Simeonov. Esperanto-kursoj en Vidin	10
	D-ro Georgi Penev. Celebro de aktiva esperantisto-filatelisto	11
	Ljubomir Leviĉarov. De kiam datas la poŝtkarto?	11
	D-ro Boris Nedkov. Kiel influas la alkoholo	11
* * *	Aktiveco de medicinistoj	13
	Prof. J. Dagys. La eminenta litova esperantisto d-ro Antanas	
	Poŝka 70-jara	14
	Mikaelo Bronŝtejn. Esperanto en Leningradaj Almanakoj .	15
	J. Pipiras. Kaunasaj esperantistoj aktivas	15
* * *	La malgranda Petro. Tradukis M. Băcev	16
	Marin Băcev. Krucvortenigmo	III
* * *	Papulando — Novgvineo	III
„ * *	Deziras korespondi	IV

Sur la kovrilpaĝo:

Momento el la Esperanto-Recitalo de la Bulgara Revolucia Poezio,
Prozo kaj Kanto en Târgoviște

Abonkotizo: jara—1,40 levoj. Por eksterlando—3,44 lv., 5 rubloj, 2,50 dolaroj aŭ egalvaloro. Por Albanio, ĈSSR, Hungario, Jugoslavio, Pollando, Rumanio, GDR, Sovetunio — 2 lv., 2,50 rubloj, 1 dolaro aŭ egalvaloro. Aparta numero — 0,14 lv.

Reklamtarifo: 0,15 lv. por sm²; sur tuta kovrilpaĝo — 80 lv.; korespondanoncoj: 5 stotinkoj por ĉiu vorto; eksterlandaj adresoj — publikigataj senpage.

EKSTERLANDAJ PERANTOJ DE „BULGARA ESPERANTISTO“

(Pliaj perantoj el diversaj landoj estas serĉataj)

ITALIO: Julia Franceschi, str. Francesco Nullo 2, Padova.

KOREO: Korea Esp. Asocio, Pieng' jang P. O. kesto 16.

NEDERLANDO: Ru Bossong, Floraplein 23 Eindhoven.

RUMANIO: Mihail Popescu, P. O. Box 205, Bucuresti 1.

SOVET-UNIO: Ivan Palkin, ul. Ŝvernika, D. 7, kor. 3, kv. 44, 117 449 Moskva V—449.

SVEDIO: Karl Krist, Deje, Box 109.



LA PACO — AFERO DE ĈIUJ KAJ DE ĈIU!

La nuna jaro restos markita en la historio de la homaro per vico da sukcesaj iniciatoj kaj interkonsentoj, ligitaj kun la granda strebo de ĉiuj popoloj sur nia planedo: plifirmigo de la tutmonda paco kaj sekureco.

Sufiĉas nur rememorigi kelkajn el ili: la normaligo de la interŝtataj rilatoj de GDR kaj GFR, la subskribo de kontraktoj inter GFR kaj USSR, respektive — kun Pollando, la interkonsento de la kvar grandaj ŝtatoj pri la t. n. okcidentberlina problemo, la vizito de Breĵnev en GFR kaj precipe — lia vizito en Usono, post kio sekvis vizito en Francio.

Kaj plej specia'e — estis subskribita interkonsento pri ĉesigo de la milito en Vjetnamio. Gravega pacvenko!

Praktika sekvo de tiuj tre gravaj paŝoj estis la normala eklaboro de la unua en la historio de Eŭropo Tuteŭropa Konferenco por Sekureco kaj Kunlaborado. Ĝi pasis je nivelo de ministroj de eksteraj aferoj kaj regist'ris solvojn de gravaj problemoj, sur kies bazo efektiviĝos la dua etapo de tiu tuteŭropa aranĝo — jam kun la partopreno de plej respondecaj reprezentantoj de la landoj en Eŭropo, de Usono kaj Kanado.

En tiu tre favora atmosfero estos kunvokita en Moskvo fine de oktobro Tutmonda Kongreso de la Pacamaj Fortoj. Jam estas organizitaj du internaciaj konsultiĝoj kun partopreno de multnombraj organizaĵoj kaj movadoj por preparo de tiu tutmonda kongreso. La du konsultiĝoj plenumis gravegan laboron kaj tio estas garantio por la sukcesplena funkciado de la kongreso mem. Estis elektita speciala internacia preparkomitato el reprezentantoj de ĉiuj partoprenintaj organizaĵoj. La komitato estas malfermita por organizaĵoj, kiuj akceptos la inviton partopreni kiel la kongreson mem, tiel ankaŭ la plenumendajn preparlaborojn. Ne unu organizaĵo preparas la kongreson kaj invitas aliajn sendi siajn reprezentantojn, sed ĉiuj organizaĵoj laboras aktive, por preparo de komuna kongreso de ĉiuj pacamaj fortoj. Tio estas principe tute nova fenomeno, kiu promesas bonan kunlaboradon porestante.

La Mondpaca Esperantista Movado digne reprezentas la tutmondan esperantistaron kiel en la konsultiĝaj aranĝoj, tiel ankaŭ en la antaŭstaranta kongreso, en kies laboro partoprenos specia'a delegitaro de MEM.

Ankoraŭ foje estis pruvite, ke la sistema porpaca agado de la esperantistaro ne restas nerimarkita de la neesperantistaj progresamaj rondoj. Ili kun sincera deziro petas la konstantan kunlaboradon de la esperantistaro en tiu tre grava sfero de socia agado. Kaj la karaktero de la internacia Esperanto-movado klare montras, ke la esperantistaro vere soifas pri mondo sen armiloj, mondo sen militoj. Nur tiam la esperantistaro povos normale agadi en ĉiuj partoj de la mondo kaj povas esperi, ke al la problemo de internacia lingvo la registaroj povas turni pli grandan atenton kaj disponigi por tiu celo homojn kaj financajn rimedojn.

La atingitaj rezultoj en la ĝisnuna pachtalo montras suflce klare, ke la socia porpaca agado donas pozitivajn rezultojn. Oni nun povas atendi ankoraŭ pli gravajn sekvojn lige kun plifirmigo de la paco, se la publika opinio en ĉiuj landoj daŭre esprimos sian favoran pozicion.

La Bulgara Esperantista Asocio neniam staris flanke de la porpaca batalo. En diversaj formoj BEA partoprenis ĝin kaj edukis siajn membrojn aktive labori kun la packomitatoj en la tuta lando. Reprezentanto de BEA estis regule elektata en la Nacia Pacdefenda Komitato. Reprezentantoj de niaj distrikaj komitatoj kaj societaj estraroj multloke (depende de ilia porpaca aktiveco) estas elektataj en la distrikaj, urbaj kaj vilaĝaj packomitatoj. Tie ili efektiveigas diversajn interesajn iniciatojn pere de Esperanto. Tiel kreskas ankaŭ la aŭtoritato de la Esperanto-movado inter la vasta neesperantista publiko.

Ne hazarde la bulgara esperantistaro staras en la unuaj vicoj de MEM, subtenas ĝin morale kaj materiale, laboras por plialtigo de ĝia aŭtoritato kaj influo en la medioj de la internacia Esperanto-movado.

Nun en la tagoj de la antaŭstaranta Nacia Pacdefenda Kongreso (en la fino de septembro) kaj la Tutmonda Kongreso de Pacamaj Fortoj (en la fino de oktobro en Moskvo) la bulgaraj esperantistoj sub la gvido de BEA kaj de la Bulgara MEM-Komitato entreprenas vicon da aranĝoj por popularigi la celojn de ambaŭ kongresoj. Plejmulto de tiuj aranĝoj trovas larĝan subtenon de porpacaj kaj aliaj sociaj organizaĵoj. Tio estas garantio por ilia sukcesa realigo.

Jes, la paco estas afero de ĉiuj kaj de ĉiu!

GRANDA ESPERANTISTA EVENTO

La 22—24-an de junio ĉ. j. en urbo Târgoviște okazis Recitalo de la Bulgara Revolucia Poezio, Prozo kaj Kanto dediĉita al la 50-jariĝo de la glora Septembra Ribelo (1923 j.) de nia popolo — la unua kontraŭfaŝista ribelo en la mondo.

Dum tiuj tagoj Târgoviște troviĝis en novaj, solenaj vestoj. Super la ĉefaj stratoj kaj altaj domoj parade flirtis bonvenigaj alvokantaj sloganoj. Kvankam la entrepreno formale estis distrikta, organizita de la samideanoj en Târgoviște, fakte ĝi preskaŭ transformiĝis en tutlandan. Venis organizite esperantistoj el Varna, Plovdiv, Burgas, Pazarĝik, Popovo, Vraca, Târnovo, Drjanovo, Trojan, Polski Trâmbeŝ kaj aliaj urboj, el multaj vilaĝoj, ofte akompanataj de ensembloj, horusoj, orkestroj. Kortuŝe estis observi, kiel tutaj klasoj de lernantoj, vestitaj en specialaj uniformoj, akompanataj de siaj instruistoj, venadis kaj per siaj ĝojaj voĉoj aplaŭdigis la multnombrian publikon.

La statistiko pri la partoprenantoj montris bonan ciferon: ĉirkaŭ 600, plejparte junpioniroj, mezlerneanoj, aliaj komsomolanoj kaj certa kvanto da plenaĝuloj.

La solena inaŭguro okazis la 22-an, je la 19 horo, en la urba teatro. Ĉiuj 600 sidlokoj en la salono estis okupitaj. Super la kurteno de la scenejo brilis slogano „Per Esperanto

por paco kaj socialismo!“ kun granda verda stelo. Ĝi kvazaŭ salutis la gastojn.

Jen — leviĝas la kurteno. Reprezenta horuso plenumas la himnon de la esperantistoj „La Espero“. Ĉiuj estime kaj emociigite staras.

La prezidantaro okupas lokon sur la scenejo. Ĉi tie estas: la kandidatmembro de CK de Bulgara Komunista Partio kaj unua sekretario de ĝia Distrikta Komitato en Târgoviște Georgi Karamfilov, la prezidanto de Distrikta Popola Soveto Stefan Penĉev, la sekretario de DK de BKP Todorka Groŝevska, la prezidanto de DK de Patrolanda Fronto Conjo Marinov, la prezidanto de Bulgara E-Asocio kaj prezidanto de Mondpaca E-Movado Nikola Aleksiev, la prezidanto de DK de Bulgara E-Asocio en Târgoviște Ivan Kânĉev — iniciatinto de la Recitalo, la prezidanto de la Distrikta Pacdefenda Komitato Milenkov, membroj de DK kaj de UK de BKP, de la Plenumkomitatoj de Distrikta kaj Urba Popolaj Sovetoj, multaj prezidantoj de Esperantaj DK kaj aliaj elstaraj esperantistoj. Post salutvortoj de Ivan Kânĉev la parolon havis Stefan Penĉev — la patrono de la Recitalo, kiu bonvenigis la gastojn.

Al li respondis la prezidanto de BEA Aleksiev. Li esprimis la dankon de la esperantistoj al la dommastroj pro la bona organizo de la Recitalo kaj pro la valora morala kaj materiala



helpo, kiun la Distrikta Popola Soveto donis al la lokaj esperantistoj por la realigo de la Recitalo.

Sekvis interesa kaj varia arta esperantlingva programo, kiun partoprenis: la popola artistino Margarita Duparinova (recitis la versaĵojn „Letero“ de Nikola Vapcarov kaj „La vojo“ de L. Zamenhof), la operkantistino Maria Angelova, la artisto el la Ŝtata Muzikteatro „Stefan Make-donski“ Veselin Damjanov, la popola kantistino Despotova. Fluis vera torento de entuziasmigita junularo, kiu deklamis kaj kantis ĉu individue, ĉu kolektive. De la scenejo vigle sonis la poezio da niaj amataj poetoj Ĥristo Botev, Ĥristo Smir-nenski, Nikola Vapcarov, Geo Milev, de repre-zentantoj de la pli nova poeta generacio kiel Veselin Ĥanĉev, Veselin Andreev, Orlin Orlinov k. a. Junvoĉe sonoris la kantoj de niaj bul-garaj komponistoj kaj de nia heroa popolo, kiu tiom longe batalis por libero kaj socia justeco kaj nun kuraĝe paŝas al la suproj de la komunismo.

Recitado kaj kantado okazis ankaŭ la sek-van vesperon. La vesperajn programojn par-toprenis nur tiuj, kiuj tre bone prezentis sin antaŭ la speciala ĵurio dum la posttagmeza konkuradoj.

La duan vesperon la publiko ĝuis ankaŭ la ludon de Belka Beleva, Anani Anev — artis-toj de Bulgara E-Teatro, kaj Vasja Petrova, kiuj majstre prezentis la komedion „Familiaj problemoj“.

Fortan impreson faris ankaŭ la partopreno de kelkaj grandaj horusoj, kiuj plenumis Esperantajn kaj aliajn kantojn: de urboj Burgas, Târgoviște, Omurtag, Polski Trâmbeŝ. Aparte notinda estas la kanthoro de Burgas, kiu preparis riĉan E-programon. Ĝiaj membroj dum la jaro lernis Esperanton.

Antaŭ la ĵurio dum la du posttagmezoj prezentis sin pli ol 65 individuaj kaj kolekti-vaj plenumantoj, precipe lernantoj de 12—18 jaraĝo.

La tekstojn de la versaĵoj kaj de la kantoj tradukis el bulgara niaj E-poetoj kaj tradukistoj Asen Grigorov, Ivan Dobrev, Atanas Lakov, Stefan Kiraĝiev, Ĥristo Gorov k. a.

La ĵurio konsistis el 5 personoj: prezidanto Belka Beleva — artistino, Asen Grigorov — E-poeto, Gergina Ra-deva — direktorino de la distri-
kta biblioteko, Margarita Pet-rova — reĝisorino de la Dram-teatro kaj Boris Ĥaĝiĵski — direk-tisto de la reprezenta miksitaj kanthoro „Rodna Pesen“ ĉe Po-pola Legejo „Napredak“ en la urbo.

La konkurado estis tute libera — ĉiu povis prezenti sin antaŭ la ĵurio en la ĉeesto de publiko.

Estis vere kortuŝe observi, kiel

la junaj konkursantoj kun tremantaj voĉetoj klare kaj belsone deklamis kvazaŭ en sia gepatra lingvo. Ni, la spektantoj, sinere kom-patis la ĵurion — kiam niere ĝi distingis la plej bonajn, kiam niere gradigos ilin. Kaj tamen ĝi faris sian gravan, respondecan laboron.

La antaŭtagmezoj de sabato kaj dimanĉo estis dediĉitaj al ekskursoj. Sabate la festiva-lanoj plenigis ok aŭtobusojn kaj vizitis la vilaĝojn Antonovo kaj Jastrebino, kie la fa-ŝistoj kruele furiozis dum la periodo de 1941—1944 j. Memore al la 112 pereintoj en la kontraŭfaŝista batalo la libera popolo starigis imponan monumenton en Antonovo. Per prezento de florkrono kaj genufleksi la esperantistoj esprimis sian dankon kaj estimon al tiuj, kiuj pereis por nia hela, feliĉa vivo. Sidantaj sur la herbo en apuda arbareto ni avide kaptis ĉiun vorton de la eksa partizano Grigor Savov, apenaŭ restinta viva, kun 30 vundoj en la korpo. Li rakontis emocie pri la sanga batalo, pri la heroismo de la laborpopolo, pri la barbareco de la faŝistoj.

Ĉe la monumento apud Jastrebino rakontis pri la tragedio de siaj samvilaĝanoj la eksa partizano Rangel Kalajĝiĵski. Malfacile estis por li paroli pri la teruraĵoj, ĉar kune kun la mortpafitoj sur tiu loko pereis ankaŭ lia tuta familio — gepatroj, fratinetoj kaj 7-jara frateto.

Neniun indulgis la modernaj sovaĝuloj: ĉi tie ili mortigis kune kun la plenaĝuloj ankaŭ 6 infanojn inter 7—14 jaroj. La faŝista ĝendar-marfo forprenis tutajn familiojn — tiujn, el kiuj iu membro fariĝis partizano, kaj tiujn, kiuj estis suspektataj kiel helpantoj de partizanoj. La ĝendarmoj mortigis po kelkaj homoj diversloke, precipe ĉe vojkruciĝoj, por terurigi la loĝan-taron. Sed pasis kelkaj tagoj kaj la malpura konscienco ektimis... Tiam ili elfosis la ka-davrojn, amasigis ilin apud v. Antonovo kaj faris brulŝtiparon: vicon da kadavroj — vicon da ligno. Poste surverŝis benzinon kaj bruligis ĉion. La restintaj postoj ili kaŝe entombigis por nenigi la postsignojn de sia krimo.

Antaŭ la monumento apud Jastrebino ni denove genufleksis sub la funebraj sonoj de

Ivan Kănĉev malfermas la Recitalon.



orkestro. Du junpioniroj recitis versaĵojn kaj esprimis la ĵuron de ĉiuj ĉeestantoj resti ĝismorte fidelaj al la idealo de la pereintoj — per ĉiuj fortoj konstrui kaj finkonstrui la komunisman socion en nia patrolando.

Grupo de junaj esperantistoj el Pazarĝik, gvidataj de sia instruisto Petko Arnaudov, ricevis tie ĉi, antaŭ la monumento, siajn kom-somolajn membrokartojn. Ilin enmanigis nia E-poeto kaj aktiva batalanto kontraŭ faŝismo kaj kapitalismo Asen Grigorov.

Dimanĉe antaŭtagmeze la festivalanoj vizitis urbon Preslav — antikva ĉefurbo de la unua bulgara ŝtato, sidejo de la fama reĝo Simeon la Granda (893—927). Kun estima intereso oni rigardis la arkeolgiajn elfosaĵojn — muroj, kclonoj kaj aliaj restaĵoj de la iama reĝa palaco, de la urba fortikaĵo, de la Ronda Preĝejo k. a. Proksime, trans rivero Kamĉija, en pitoreska valo ni vizitis ankaŭ la restaĵojn

de la monaĥejo Patlejna, kiu en la epoko de Simeon farigis centro de la bulgara kultura kaj literatura vivo.

Neforgeseblajn rememorojn forportis ĉiu partopreninto en la brila Esperanto-festo. Plenis ĉies animon kaj la altnivela E-Recitalo, kaj la vizitoj de Antonovo, Jastremino, Preslav kaj Patlejna. Ĉiuj kredis, ke la Recitalo en Târgoviŝte donos novan paŝon al la E-movado ne nur en tiu regiono, sed ankaŭ en la tuta lando. Kun tiu kredo disiĝis junaj kaj plenaĝaj esperantistoj, premante forte la dekojn da amikaj manoj kaj dirante „Ĝis revido estontjare en Kazanlâk!“

Nano Nanov

Kunĉo Vâlev

Noto de Red. En urbo Kazanlâk oni projektas organizi en 1974 tutlandan printempan feston de Bulgara E-Junularo.

PREMIOJ DE LA RECITALO

INDIVIDUAJ RECITANTOJ

Unua premio — perfektaj:

Snejina Radoslavova — el Târgoviŝte
Margarita Georgieva — el Târgoviŝte
Galina Koleva — el Târgoviŝte
Vanja Dimitrova — el Popovo
Mariana Kostova — el Popovo
Antoaneta Nikolaeva — el Popovo
Kinka Pejкова — el Popovo
Veliĉka Guŝeva — el Plovdiv

Dua premio — tre bonaj:

Tatjana Dimitrova — el Târgoviŝte
Ljubka Stefanova — el Târgoviŝte
Julia Dimova — el Târgoviŝte
Angel Rusev — el Popovo
Jordanka Borisova — el Târgoviŝte
Violeta Mihajlova — el V. Târnovo
Bojanka Peneva — el V. Târnovo
Cvetanka Kirkovska — el v. Jivkovo, distrikto de Sofio
Liljana Milaĉkova — el Târgoviŝte
Vasil Georgiev — el Ŝumen
Maria Grozeva — el Târgoviŝte
Marijka Stefanova — el Târgoviŝte

Tria premio — bonaj:

Donka Ivanova — el Popovo
Cenka Dimova — el Popovo
Ginka Ivanova — el Popovo
Rumjana Koleva — el Popovo
Jordanka Todorova — el Popovo
Cvetanka Gergova — el V. Târnovo
Veneta Kalinova — el Dve Mogili, distr. de Ruse

Nadeŝda Todorova — el Ihtiman
Ĥristo Kurumilev — el Kazanlâk
Nikola Vâlkanov — el Burgas
Jordanka Lazarova — el Ŝumen
Zafira Dimitrova (kantado) el Varna
Ĵuljeta Kâneva — el Tolbuhin

RECITANTAJ GRUPOJ

Prezentis sin tre bone:

Grupo de lernantinoj el lernejoj „Sava Gerenov“ kaj „Georgi Dimitrov“ de Târgoviŝte — per la poemo „Septembro“ de Geo Milev.

Grupo de gelernantoj el lernejo „Sava Gerenov“ de Târgoviŝte — per la verkaĵo „Nesto de herooj“ de Gergina Radeva.

Prezentis sin bone:

Grupo de lernantinoj el la Ekonomia Teknikumo de V. Târnovo — per la verkaĵo „La spiro de l'partio“ de Mladen Isaev.

KANTGRUPOJ

Prezentis sin bone:

Kantgrupo de lernantinoj el la Ekonomia Teknikumo de V. Târnovo

Kantgrupo de junulinoj el Loveĉ

Kantgrupo de gelernantoj el ihtiman kaj v. Jivkovo, Sofia distrikto.

Kantgrupo de gelernantoj el vilaĝoj Kardam kaj D. Ganevo, distr.kto de Tolbuhin.

KANTĤOROJ

Reprezenta kanthoro „Rodna pesen“ el Târgoviŝte.



Virina ĉambra kanthoro ĉe la Urba Popola Soveto de Târgoviște.

Ensemblo por kantoj kaj dancoj „Mizija“ ĉe la Sindikata Kulturdomo en Târgoviște.

Miksa kanthoro „Nigra Maro“ ĉe la Distrikta Komitato de Bulgara E-Asocio en Burgas.

Miksa kanthoro „Balkanski Zvuci“ ĉe popola legejo „Otec Paisij“ de u. Omurtag

Ĉiuj individuaj premiitoj ricevas E-literaturon kaj atestojn.

Ĉiuj kantgrupoj kaj la junpionira danckolektivo ricevas la memorflageton de la Recitalo kaj atestojn.

La recitantaj grupoj, kiuj prezentis sin tre bone, ricevas la memorflageton de la Recitalo, E-literaturon kaj atestojn por ĉiu partoprenanto. La recitantaj grupoj, kiuj prezentis sin bone, ricevas la memorflageton de la Recitalo kaj atestojn por ĉiu partoprenanto.

Ĉiuj kanthoroj kaj la ensemblo de P. Trâmbeș ricevas la memorflageton de la Recitalo kaj ankoraŭ: „Rodna Pesen“ — la monpremion de DK de Patroplanda Fronto en Târgoviște; la ĉambra kanthoro — la monpremion de Distrikta Pacdefenda Komitato; la ensemblo „Mizija“ — la monpremion de Distrikta Popola Soveto — Fakto de Arto kaj Kulturo; la muzikkolektivo de P. Trâmbeș — la monpremion de Distrikta Konsilantaro de Sindikatoj. La tri monpremiojn de Distrikta Popola Soveto de Târgoviște ricevas kanthoroj „Nigra Maro“, „Balkanski Zvuci“ kaj la folkloro ensemblo de uzino „Ĥan Krum“.

Virina Folkloro Ensemblo ĉe uzino „Ĥan Krum“ en Târgoviște

Estrada muzikkolektivo ĉe la E-Societo en u. Polski Trâmbeș.

DANCKOLEKTIVOJ

Danckolektivo ĉe la Junpionira Domo de Târgoviște.

Ĉiuj partoprenantoj en la Recitalo, kiuj ne estas aparte premiitaj, ricevas atestojn.

Ĉiuj E-societoj, kiuj helpis la preparon de la Recitalo, ricevas memorflagetojn.

La jenaj aktivuloj, kiuj konsiderinde helpis la laboron de la Recitalo, ricevas atestojn:

Ivan Kânĉev — prezidanto de DK de BEA en Târgoviște,

Gergina Radeva — direktorino de la Distrikta Biblioteko en Târgoviște,

Marijka Rajĉeva — E-instruistino el Târgoviște,

Vâlka Dankova — E-instruistino el Popovo,

Penka Kateva — E-instruistino el V. Târnovo,

Stojanka Alaĝova — E-instruistino el v. Ĵivkovo, Sofia distrikto,

Elena Radoeva — E-instruistino el Târgoviște,

Roza Karaĝova — E-instruistino el Ĥtiman,

Dimitr Petkov — E-instruisto el Gorna Orjaĥovica.

CELEBRO DE ESPERANTISTO-VETERANO

La 6-an junio ĉ. j. la sofia esperantistaro solene celebris la 90-an naskiĝtagon de Stefan Minkov — unu el la veteranoj de la bulgara E-movado.

La salono de la tuturba E-Societo „Maksim Gorkij“ estis plenplena. La celebron malfermis Georgi Dolapĉiev — prezidanto de la Sofia Distrikta E-Komitato. La programo konsistis el du partoj.

La belartan programon partoprenis grupo da lernantoj el 28-a Meza Politeknika Lernejo de Sofio, kiuj plenumis tri E-kantojn. Agrabla surprizo estis la recito de la Zamenhofa „La Vojo“ fare de Stefka Minkova — filino de la jubileulo. Partoprenis ankaŭ: Vera Vâjarova, operkantistino, kiu recitis du versaĵojn — „Espero“ de As. Grigorov kaj „Kie estas Bulgario“ de Ivan Vazov en traduko de As. Grigorov; Kunĉo Vâllev — recitis arde „Al la fratoj“ de Zamenhof.

La dua parto komenciĝis per konciza raporto de k-do Krâstju Karucin, vicprezidanto de la Sofia DK, pri la vivo kaj agado de l'jubileulo.

Post li Violin Oljanov legis interesajn rememorojn de la celebrato aŭskultatajn kun granda intereso.

Sekvis salutparoloj: en la nomoj de CK de Bulgara E-Asocio kaj de la Sofia Instruista E-Societo „Diĉo Petrov“ salutis la jubileulon Kunĉo Vâllev — la ĉefredaktoro de „BE“, kiu bondeziris al li fariĝi nia verda, Esperanta centjarulo. Aliaj salutoj: de Distrikta E-Komitato — Georgi Dolapĉiev, de la Sofia E-Societo „M. Gorkij“ — prezidanto Nanov, de Teknikista Sekcio — Georgi Dokov, de E-Societo „Heroldo“ — Katia Maneva, de E-Societo de Blindaj Esperantistoj „Balkana Stelo“ — Tanja Ruseva.

Ĉiuj substrekis la meritojn de la jubileulo al la bulgara E-movado, lian ekzemplon ligi Esperanton kun la praktiko, kun la vivo.

La veterano respondis sincere kaj energie al la gratuloj kaj bondeziroj.

Vera Vâjarova

El la parolado de Krâstju Karucin

Stefan Minkov agis longe sur la Esperanto-kampo, kaj kelkaj generacioj da bulgaraj esperantistoj havis rektan utilon de lia agado. Sed li donis sian kontribucion ankaŭ en la ĝenerala socipolitika kampo por la bono de nia popolo, por efektivigo de la progresemaj ideoj de l'socialismo.



Li naskiĝis la 23-an de majo 1883 en urbo Razgrad en la familio de metiisto. Jam infano li fariĝis orfo, sen patro. La patrino obstine batalis kontraŭ la mizero. Ĉe grandaj suferoj lia pli aĝa frato kaj li mem finis la lokan gimnazion. En 1899 j. la adoleskulo Stefan Minkov fariĝis kursano en la Mara Maŝinlernejo en Varna. Fininte ĝian trijaran kurson li en 1902 j. estis sendita ofice al Francio por praktiki kiel teknikisto. Post la reveno dum la sekva jaro li daŭrigis la studadon en la supera kurso de la lernejo, kaj ricevis diplomon de inĝeniero. La periodon 1907—1911 li pasigis en Francio, kie li laboris kiel teknikisto. Post sia reveno en Bulgarijn li estis oficigita kiel instruisto en la Mezgrada Mekanika-Teknika Lernejo en Sofio. Ĉi tie li instruis ĝis 1939 j., kiam li emeritiĝis. Multon kontribuis Stefan Minkov en la nobla instru-

ista profesio, pro kio li estis alte estimata. Multajn jarojn li instruis paralele ankaŭ en Popola Metiista Lernejo en Sofio.

Altklera fakulo, nia jubileulo verkis — ĉu memstare, ĉu kune kun aliaj aŭtoroj — 11 fakajn lernolibrojn por la mezgradaj kaj superaj teknikaj lernejoj. Preskaŭ ĉiu el ili havas po 3—4 reeldonoj. La unua lia lernolibro datiĝas de 1918 j., la lasta — de 1965 j. Notinda estas ankaŭ lia kunlaboro al vico da teknikaj periodaĵoj.

Dufoje la paca instruista laboro de Stefan Minkov interrompiĝis pro militoj. En la Balkana Milito (1912 j.) li estis grave vundita.

La socipolitikan agadon Stefan Minkov ŝatis jam dum sia frua juneco. En la Mara Maŝinlernejo li partoprenis socialistan klerigan rondeton, gvidata de Anton Ivanov — la posta elstara bulgara laborista kaj partia aganto, mortkondamnita de la faŝistoj en 1942. Dum sia restado en Francio Minkov partoprenis multfoje manifestaciojn de la franca sindikata kaj socialista movado. En 1914 li aliĝis al la revolucia Bulgara Socialdemokrata Partio. Li havis amikajn rilatojn kun Dimitr Blagoev — la fondinto kaj gvidanto de la marksisma partio de la bulgara laborista klaso. Dum la kruela faŝista teroro en 1925 j. Minkov estis arestita kaj provizore eksigita de sia instruista ofico.

Ĉar ni celebras la 90-jariĝon de nia kara Esperanto-veterano, decas, ke la pli granda parto de ĉi tiu prelego estu dediĉita al priskribo de lia E-agado. Ni tamen nun ellasas tiun parton. Ja Stefan Minkov mem tiel allogas rakontas pri tio en siaj „Rememoroj“. Ni dezirus mencii nur kelkajn momentojn de lia E-agado, netuŝitajn en la „Rememoroj“.

Dum la malfacilaj jaroj post la Balkana Milito (la periodo 1913—1916 j.) Stefan Minkov estis sekretario de la Bulgara Esperantista Asocio (tiam Bulgara Esperantista Societo). Sekretario de l'Asocio li estis ankaŭ en 1920—1921 j. En tiu tempo li partoprenis ankaŭ la redaktadon de l'asocia organo „Bulgara Esperantisto“. En la revuo li skribis precipe pri la tutmonda laborista E-movado. Li efektivigis personan kontakton kun la tiam ministro de la popola klerigo Stojan Omarĉevski kaj pledis pri fakultativa enkonduko de Esperanto en la bulgarajn mezlernejojn. Li estis la unua lektoro de Esperanto, oficiale oficigita en nia lando.

En 1922 j. nia jubileulo estis unu el la fondintoj de la Esperantista Kooperativa Societo, elektita ankaŭ en ĝia estraro. Li partoprenis same la fondon de l'unua Bulgara Esperantista



Kooperativo kaj en la periodo 1956 — 1963 estis membro, sekretario aŭ virprezidanto de ĝia estrato. Vaste konata estas la aktiveco de Stefan Minkov ankaŭ en la Sofia Tuturba E-Societo „Maksim Gorkij“.

Modeste, senbrue, obstine agis nia kara jubileulo sur la Esperanta kampo. Multon li faris

EL LA REMEMOROJ DE STEFAN MINKOV

Mi naskiĝis la 23-an de majo 1883 j. en urbo Razgrad. Kun Esperanto mi konatiĝis en 1901 kiel lernanto en la Mara Maŝinernejo de Varna. Mi lernis ĝin laŭ la lernolibro de Ĥristo Popov kaj Georgi Oreŝkov, eldonita en 1900 j. en Plovdiv. Ĝia titolo estis „Plena manokonduko por ellernado de la lingvo internacia Esperanto“. Post kelkaj monatoj de studado mi komencis intensan korespondadon kun fremdlandaj esperantistoj, kies adresojn mi trovis en la tiamaj E-revuoj. La granda nombro da leteroj kaj poŝtkartoj, kiujn mi ricevadis en la Mara Lernejo, provokis intereson ĉe la tiam lernejestro leŭtenanto Solarov. Li vokis min al la direkcio kaj demandis, en kiu lingvo ili estas skribitaj, kaj kiu sendas ilin al mi. Mi klarigis al li kio estas Esperanto, kiu estas ĝia aŭtoro. La lernejestro permesis al mi daŭrigi la korespondadon kaj regule ricevi miajn esperantaĵojn.

En 1902 j. en Varna venis Georgi Atanasov el Burgas kaj malfermis E-kurson en la popola lernejo „Sankta Klimento“. Tie ni organizis E-societon. Tiutempe por la unua fojo min vizitis la bulgaraj s-anoj Ilija Silvestriev kaj Ilija Todorov el Ŝumen. Fininte la studadon en la Mara Maŝinernejo mi ricevis oficon kiel mekanikisto en la milita krosŝipo „Nadejda“ (Espero). Ankaŭ ĉi tie mi daŭrigis mian korespondadon, kaj pro tio la ŝipestro kapitano St. Dimitriev ofte vokis min en sian kajuton, kaj mi devis klarigi pri ĉio ricevata el eksterlando — leteroj, revuoj ktp.

Mi korespondis ankaŭ kun rusaj esperantistoj, kaj kiam nia krosŝipo vizitadis la rusajn nigramarajn havenojn, kiel Odesa, Nikolaev, Sevastopol, Jalta, Evpatoria, Batumi k. a., mi ofte povis renkontiĝi kun miaj korespondantoj en ĉi tiuj urboj. Ekzemple, kiam en 1904 j. mia rusa korespondanto S. Danailov el Sevastopol eksciis, ke nia krosŝipo estas alveninta, li tuj venis prezenti sin al la ŝipestro kune kun kelkaj aliaj esperantistoj. Tial mi ricevis unutagan libertempon por viziti la urbon. Je mia honoro oni aranĝis bankedon en la margardeno, post kiu ni faris komunan promenadon tra la urbo, parolante nur en Esperanto.

En 1904 j. nia Ŝtata Militfloto mendis la konstruon de tri torpedŝipoj en la franca fabriko „Schneider“ (Ŝnajder) en Chalon sur Saône, kaj lige kun tio nia ŝipestro proponis

por prezenti nian patrujon eksterlande. Ni ĉiuj rekonas liajn meritojn. Ankaŭ la neesperantista socio agnoskas la sindonan socipolitikan kaj klerigan agadon de Stefan Minkov. Kelkfoje li estis honorita per ŝtataj ordenoj, inter kiuj la ordeno „Kiril kaj Metodij“ — I grado.

al mi forveturi al Francio kiel homo kun internaciaj rilatoj per Esperanto. Mi volonte kaj kun granda ĝojo akceptis la proponon.

En Chalon sur Saône mi tuj konatiĝis kun la lokaj gesamideanoj kaj regule vizitis la ĉiusemajnajn E-kunvenojn de la societo. Multaj esperantistoj interparolis kun mi — la fremda samideano, veninta el Bulgario. Eksciinte pri mi unu franca esperantisto — s-ro Charles Jadeau de la proksima urbeto Mercurey, trovis min kaj ni fariĝis bonegaj amikoj. Ĉiudimanche li vizitis min per sia aŭtomobilo, kaj ni ambaŭ faris ekskursojn kaj vizitojn al esperantistoj de Dijon, Mâcon, Beaune, Marseille k. a. Li lernis Esperanton de mi, kaj mi — la francan de li. Dum 3—4 monatoj mi povis ellerni tre bone la francan lingvon kaj fariĝi interpretanto de miaj bulgaraj amikoj en la hotelo kaj en la fabriko, kie ni laboris.

Mi daŭrigis mian viglan E-korespondadon kaj regule vizitadis miajn korespondantojn en diversaj francaj urboj. Mi ofte vojaĝis ankaŭ Svisujon, kie mi vizitis Gêneve, Zŭrich, Bern k. a., ĉar de Francujo al Svisujo oni vojaĝis sen kiaj ajn pasportoj. Tiam mi konatiĝis kun multaj svisaj samideanoj, inter kiuj ankaŭ kun la plej elokventa E-oratoro Edmond Privat kaj la fondinto de UEA — Hector Hodler.

Iun dimanĉon mi devis viziti mian francan korespondanton, s-ran Mathouillet en urbo Beaune, kie estis grandega hospitalo, medicina fakultato kaj sciencesplora medicina instituto. Por ke mi povu ekkoni mian korespondanton ĉe la stacidomo, ni interkonsentis, ke li tenu verdan standardon en sia mano. Sed kio okazis? Kiam nia vagono haltis ĉe la stacio, mi vidis, ke la tuta kajo estas plenplena de renkontantoj, kaj la E-flago svingiĝas en la mezo de la homamaso. Kiun ili renkontas?

Mi elvagoniĝis kaj mia korespondanto Mathouillet prezentis min al la rektoro de la medicinfakultato prof. Bord, al la estraranoj de la loka E-societo kaj al multaj aliaj samideanoj el la urbo.

De la fervojstacio ekmarŝis granda esperantista manifestacio tra la urbo al la grandega hospitalo. Tie estis aranĝita bankedo je mia honoro, post kiu sekvis salutoj, paroladoj, amuzaĵoj ĝis malfrua vespero. Poste mi eksciis de mia korespondanto, ke li donis anoncon en la loka gazeto pri la tago kaj la horo de mia

alveno, invitante la esperantistojn kaj la urbanojn veni al la stacio por bonvenigi la bulgaran esperantiston.

Ĉio ĉi estis granda propagando pri Esperanto dum tiu tempo, kiam en Francio estis fondita la Franca Societo por Propagando de Esperanto, kies prezidanto tiam estis Louis de Beaufront. La saman jaron mi prezentis min al ekzameno de Esperanto en Parizo kaj ricevis dokumenton pri instrurajto.

Post unujara restado en Francio mi estis devigita reveni Bulgarijon per militservi ankoraŭ du jarojn pro rekonstruo de la novaj torpedŝipoj. Post tio mi daŭrigis mian militservon en la krosŝipo.

En 1906 j. dum vojaĝo al rusaj nigramaraj urboj ni vizitis Jalta, kie mi havis korespondanton. Li venis sur nian krosŝipon kun kelkaj rusaj samideanoj kaj petis nian ŝipestron permesi al mi iri kun ili al la proksima somerrestadejo „Jasna Poljana“ por viziti la faman rusan verkiston Lev Tolstoj, granda amiko de Esperanto. Ni estis akceptitaj en la ripozĉambro de la verkisto. Enirinte mi salutis lin per la vortoj: „Bonan tagon, kara s-ano Tolstoj.“ Li atente alrigardis min kaj tuj respondis: „Bonan tagon, kara bulgara samideano!“

En la biblioteko de Tolstoj oni montris al mi ekzempleron de la unua libro de Esperanto, kiun Zamenhof en 1888 sendis al la verkisto.

La sanstato de Tolstoj ne estis en bona ordo, krome ekstere atendis multe da aliaj vizitantoj, tial ni ne restis longtempe ĉe li.

En 1907 mi jam ekŝiĝis de la militservo kaj mi denove forveturis al Francio, urbo Calais, kie mi tuj eklaboris en fabriko por konstruado de ĵakardaj teksmaŝinoj. Ankaŭ en ĉi tiu okazo al mi helpis Esperanto. La franca samideano Perrin, kiu posedis presejon en la urbo, rekomendis min. Ĉi tie mi gvidis E-kurson por 40 lernantinoj en la knabina lernejo. Ili finis sukcese la kurson dank' al la fervora helpo de la direktorino, kiu mem estis aktiva esperantistino.

Post nelonge mi translokiĝis en Bulonjon ĉe Maro — la urbo de la Unua kongreso de Esperanto. Ĉi tie vivis mia korespondanto Maurice Duchochois, posedanto de fabriko por artefarita glacio kaj same de 3—4 fiŝkaptistaj vaporŝipoj. Li tuj oficigis min kiel mekanikiston en sia fabriko. Tiam mi laboris tre vigle en la Esperanto-movado. Prezidanto de la loka E-societo estis s-ro A. Michaux, advokato, vicprezidanto — Lucien Sergeant, ankaŭ advokato, kaj sekretario inĝ. Baire. Mi regule partoprenis la propagandajn iniciatojn de la societo kaj akurate plenumadis miajn taskojn kiel aktivulo.

En la sama jaro mi partoprenis la III-an Universalan Kongreson de Esperanto en Kembriĝo (Britujo), kiun ĉeestis nia kara majstro L. L. Zamenhof mem, sed tie mi ne havis okazon

personoj kontaktigi kun li. Post la fermo de la kongreso mi revenis al Bulonjo ĉe Maro. Ĉi tien venis ankaŭ Zamenhof, solene renkontita de l'estraro de la loka Esperanto-societo kaj de multaj samideanoj. La sekvan tagon estis aranĝita oficiala bankedo honore al Zamenhof kaj lia edzino Klara, kiu akompanis lin. La bankedo okazis en la domo de la vicprezidanto Sergeant. Mi kiel fremdlanda esperantisto ankaŭ estis invitita, kaj mia sidloko estis inter Zamenhof kaj lia edzino.

Dum la bankedo Zamenhof parolis pri siaj impresoj de la Kembriĝa Kongreso kaj pri siaj neforgeseblaj rememoroj pri Bulonjo ĉe Maro, pri la I-a UK de Esperanto, kiun li ĉeestis. Post Zamenhof la parolon havis mi. Mi rakontis pri la E-movado en Bulgario, pri miaj spertoj rilate al la praktika utiligo de Esperanto dum mia vojaĝo tra Eŭropo, pri mia renkontiĝo kun la fama rusa verkisto Lev Tolstoj kaj pri ĉiuj miaj travivaĵoj de esperantisto en Francio. Al mi la ĉeestantoj direktis multajn demandojn. Post mi parolis la prezidanto Michaux kaj kelkaj aliaj samideanoj. Dum mi multe konversaciis kun nia majstro pri plej diversaj temoj, kaj nia interparolado estis tiel flua kaj rapida, ke ĝi faris fortan impreson al la ĉeestantoj, kiuj apenaŭ sekvis nin. Mi klarigis, ke ni, la bulgaroj, kiel sudeŭropanoj, ĉiam parolas tre rapide ne nur en siaj gepatraj, sed ankaŭ en fremdlandaj naciaj lingvoj, kiujn ni scipovas.

Post la bankedo ni ĉiuj promenis tra la urbo, faris fotojn. La verdaj standardoj solene flirts tra la urbaj stratoj. Ni faris promenadon ankaŭ sur la maro per vaporŝipeto de s-ano Duchochois. La ŝipeto estis ornamita per verdaj flagoj. Ni faris grandan propagandon pri Esperanto navigante tra la Manĉo al la brita haveno Douvres, situanta vidalvide al Bulonjo ĉe Maro.

Post la marvojaĝo ni estis solene bonvenigitaj de la urbestro kaj estraranoj de la komunumo, kiuj atendis nin sur la havenkajo. La urbestro salutis d-ron Zamenhof kaj lian edzinon. Reveninte en la urbon, ni estis invitetaj en la urbodomon, kie speciala ĥoro kantis la Esperantan himnon kaj kelkajn aliajn kantojn. Inter la ĉeestantoj mi povas menci la jenajn eminentajn samideanojn: Boirac — rektoro de Dijona Universitato, Louis de Beaufront, Carlo Bourlet, Theophile Cart — profesoro de la Pariza Sorbono.

La saman tagon vespere ni akompanis d-ron Zamenhof kaj lian edzinon ĝis la fervojstacio. Ili forveturis al Parizo. La plej forta impresoj, kiun mi konservis de mia persona konatiĝo kun nia majstro, estis tiu, ke li estis homo kun altnobla animo kaj granda modesteco.

(Sekvas en n-ro 7—8)



VESPERO DE LA INTERNACIA AMIKECO

La lernejana E-Societo „Anne Frank“ kaj la Lernejana Komitato de Komsomolo en la Teksa Teknikumo de u. Vraca organizis Vesperon de l'internacia amikeco. La vespero estis dediĉita al la X Monda Festivalo de l'Junularo kaj Studentoj en Berlino, al la 50-jariĝo de la unua en la mondo kontraŭfaŝista ribelo de la bulgara popolo en Septembro 1923 kaj al la tutmonda movado por paco kaj amikeco inter la popoloj. Ĝi okazis en la Junulara Domo. Ĉeestis gastoj el la urbo, el la distrikto (Mezdra kaj Bjala Slatina) kaj el u. Ĥaskovo.

Raportojn pri la patriotisma kaj internaciisma edukado de l'junularo kaj la rolo de Esperanto por firmigo de paco kaj amikeco en la mondo faris Enjo Daskalov — instruisto de Esperanto en la Teknikumo. Ekaterina Filipova — sekretario de la Lernejana Komitato

ĉe la Matematika Gimnazio, rakontis emocie rememorojn pri sia partopreno en la dua junulara festivalo de l'amikeco. Varme salutis la ĉeestantojn s-anino Veselina Toneva en la nomo de la esperantistoj en u. Ĥaskovo.

Estis ricevita pli ol 30 leteroj kaj telegramoj el la lando kaj eksterlando.

La lernantoj prezentis literaturan programon, kiun partoprenis ankaŭ la 6-jara Kamelia E. Daskalova per deklamado de la versaĵo „Moskvo“ de Ĥristo Smirnovski.

La saman tagon Enjo Daskalov faris modelan lecionon de Esperanto en la I-a klaso. Ĉar tio estis la antaŭlasta studhoraro de la lernojaro, multaj lernantoj, dezirantaj plialtigi siajn poentojn, laŭ ilia peto estis lastfoje ekzamenitaj antaŭ la gastoj.

Post la leciono okazis distrikta instruista konferenco, organizita de la Instruista E-Societo en Vraca kaj la DĤK. Oni pridiskutis la ĝisnunan laboron de la instruistoj-esperantistoj en la distrikto kaj starigis taskojn por la nova lernojaro.

Veselin Nikolov

La Pupteatro de Ruse en Danlando


PUPOJ PAROLAS EN ESPERANTO

Laŭ interkonsento kun s-ro P. V. Bagger, reprezentanto de la Dana Ministerio de Kulturo, la Pupteatro de Ruse faris turneon en Danlando de la 19 ĝis la 31 de marto ĉ. j. kun la fama fabelo de Andersen „La Neĝa Reĝino“, dramigita kaj adaptita por pupteatro de R. Rajkov.

Dum la turneo la Pupteatro prezentis 16 spektaklojn (du kromajn) en 8 urboj, troviĝantaj en diversaj regionoj de la lando. La unua spektaklo okazis en urbo Kolding en katolika lernejo. Infanoj kaj instruistoj ankoraŭ en la koridoroj akceptis la bulgarajn aktorojn tre varme, kun kantoj, frunte kun la direktoro. Antaŭ la prezentado al ĉiu dana infano estis donita speciale presita por la okazo materialo en dana lingvo kaj Esperanto kaj prospekto pri Bulgario. La unuaj sonoj, lumoj, apero de la pupoj elvokis varmajn aplaŭdojn. La tuta spektaklo estis plena je entuziasmo kaj bonhumoro. En la memorlibro la instruistoj skribis, ke la spektaklo estis por ĉiuj mirinda travivaĵo. Tute ŝanĝiĝis ilia imago pri la puparto. Estas necese rimarki ĉi tie, ke en Danlando la puparto, kia ĝi estas ĉe ni, ne estas konata. Ekzistas apartaj pupistoj aŭ du-tri personaj trupoj, kies puparto similas al la vilaĝfoira. Eble pro tio la pli aĝaj lernantoj uzis diversajn manierojn de premo al la direktoro, por ke li konsentu pri kroma spektaklo. Kaj ili sukcesis. Post duonhora ripozo okazis nova prezento.

La sekvan tagon la trupo faris prezenton en la norda parto de la duoninsulo Jutlando — en urbo Randers. Tie en la kulturdomo, kiu samtempe estas granda biblioteko, urba kaj arta galerio, du sinsekvaj spektakloj estis vizititaj de pli ol 500 infanoj kaj plenaĝuloj. Longe post la prezento la direktoro de la kulturdomo kaj aliaj spektantoj interparolis kun estimo kaj ĝojo kun la trupanoj.

Herning estis la tria punkto de la turneo. La salono de la urba biblioteko pleniĝis de h'haraj infanoj kaj iom da plenkreskuloj. Denove aplaŭdoj, frapoj kaj fajfo pro ĝojo kaj plezuro. La vesperon en la ho'e'lo okazis adiaŭo kun nia simpatia jutlanda gvidanto kaj tradukisto — la juna studento Bent Laursen. Popolkantoj, interŝanĝo de donacoj kaj adresoj. Ĉe la fino „nia Bento“ ŝtelante la finvortojn de la Neĝa Reĝino, diris: „La fabelo finiĝis. Bonan nokton!“ Sed la sekvan tagon anstataŭ resti en Jutlando li venis kun la trupo eĉ ĝis Roskilde en Selando por resti kun ni iom pli longe. Vespere en la bela domo de s-ro Bagger



ĉiuj estis varme akceptitaj laŭ dana maniero per sandviĉoj, kukoj, dolĉaĵoj, glaciaĵo, kafo. La sola peto de la dommastroj al la grupo: plenumi bulgarajn kantojn. Tiel ĝis malfrua nokto. Dum la vespero ĝis 10 al familio Bagger estis la esperantista familio Ivanka kaj Egon Sarup. Ivanka estas bulgara esperantistino el Ruse. Ŝia trijara filo jam fariĝis poligloto. Kun la infanoj li parolas dane, kun la gepatroj — esperante kaj kun la trupanoj — bulgare. La dommastroj ankaŭ kantis tradiciajn danajn kantojn.

Dum la sekvaj kvar tagoj — ok spektakloj en la sateliturbaj de Kopenhago: Lyngby, Albertslund, Olstykke kaj Jyllinge. En Lyngby la prezentoj okazis en la kulturdomo, en la aliaj urboj — en lernejoj. La trupo vizitis ankaŭ la faman Frederiksberg, Hamlet-kastelon Kronborg en Helsingor kaj per pramo por kelkaj horoj ĝi vizitis ankaŭ Svedujon.

La lastaj du prezentoj okazis en urbo Faksesur. La spektakloj estis vizititaj de pli ol 600 infanoj kaj instruistoj. La reago de la publiko estis ĉiam tre varma. Al unu el la spektakloj venis ankaŭ respondecaj membroj

de la bulgara diplomatia korpo. Ĉi tie post la prezentoj okazis amika renkontiĝo kun la direktoro kaj instruistoj de la lernejo. La trupo estis esperantlingve salutita de instruistoj-esperantistoj. Denove okazis amika interparolo pri la spektaklo, pri la teatro, pri Bulgario kaj ĝia supreniro. Vespere por la lasta fojo familio Bagger akceptis oficiale la teatron en malnova tricentjara tradicia restoracio. Al ĉiu membro de la trupo estis donita donaco — dana porcelanaĵo. K-do Bujukliev — la unua sekretario de la Bulgara Ambaskado, k-do Jakov — direktoro de la teatro kaj s-ro Bagger esprimis siajn impresojn. Ĉiu konkludis, ke la turneo estis la plej longedaŭra el ĉiuj similaj, la plej sukcesa, la plej utila, kontribuanta por amikiĝo de Bulgario kaj Danlando. Ĉe glaso da kafo — „anstataŭ larmoj denove kelkaj bulgaraj kantoj“, kiel diris s-ro Bagger. Fine ni tutkore dankis al niaj afablaj dommastroj. Post la sukcesa turneo — ĝis revido familio Bagger, ĝis revido Fakse, ĝis revido Danlando! La sekvan tagon — survoje al la amata patrujo.

Jordan Kazakov

SINDONA AGADO DE ESPERANTO-VETERANO

La 6-an de majo ĉ. j. en Pazarĝik okazis jarkunsido de la Distrikta Komitato de Bulgara E-Asocio.

La vicprezidanto k-do Stojan Tanev raportis, ke rezulte de la ekonomia agado de DK dum la jaroj 1970, 1971 kaj 1972 (en porka farmo) kaj la aliaj enspezfontoj DK nun havas en la ŝparkaso 12 600 levojn. Tiun sumon DK ricevis pleje dank' al la streĉa kaj obstina laboro de la sekretario de E-Societo „Radio“ en Pazarĝik k-do Ivan Stranski.

Kun alta konscio kaj profunda amo al nia Esperanto-afero k-do Stranski sindone kaj senpage laboris pli ol du jarojn — de septembro 1970 ĝis la 31 de decembro 1972. Krom tio komence de januaro 1973 k-do Stranski faris alian noblan geston: el sia propra ŝparita mono li donacis al DK 1000 levojn por helpi la konstruadon de Esperanto-klubejo en Pazarĝik. Abnegacia paŝo! Laŭdon al similaj sindonaj ŝatantoj de Esperanto!

La Plenkunsido de DK decidis, ke oni komencu la konstruadon de propra E-klubejo en la urbo.

R. Georgieva

Esperanto-kursoj en Vidin

Dum tiu ĉi jaro ĉe la loka E-societo funkciis E-kurso por civitanoj, kiu finiĝis sukcese en majo kun ekzameno antaŭ speciala komisiono. Ĉiuj gekursanoj bone legis, tradukis kaj memstare rakontis. Lige kun la finiĝo de la E-kurso estis aranĝita kunveno. La prezidanto de la societo disdonis atestojn, bondezirante al ĉiuj gekursanoj daŭrigi la studadon de Esperanto kaj kontakti pere de ĝi kun geesperantistoj el eksterlando. Al li respondis la kursanino Tinka Petkova.

En la fundamenta lernejo funkciis E-kursoj por lernantoj. La praktiko montras, ke estas necese havi du lecionojn semajne — unu ne sufiĉas. La intereso de la lernantoj al Esperanto estas sufiĉe granda. Multaj jam korespondas kun gelernantoj el eksterlando.

G. Simeonov

Georgi Simeonov kun parto de siaj kursanoj en Vidin.



La 28-an de majo ĉ. j. la filatelistoj kaj esperantistoj en Pazarĝik organizis celebron okaze de la 75-jariĝo de k-do Ljubomir Leviĉarov, kiu jam 60 jarojn laboras kiel filatelisto kaj 50 jarojn kiel esperantisto.

Pli ol duonjarcento k-do Leviĉarov bone kunligas la filatelon kaj Esperanton. Li havas



multajn poŝtmarkajn kolektojn, inter kiuj la Esperanta kolekto estas unu el la plej valoraj — ĝi ricevis altan pritakson ĉe multaj enlandaj kaj internaciaj ekspozicioj. K-do Leviĉarov estas unu el la fondintoj de la Filatela Societo en Pazarĝik kaj longjara aktivulo de la loka E-Societo „Radio“.

La prezidanto de la Filatela Societo Boris Ljakov legis salutadreson al la jubileulo en la nomo de la estraro. Oni legis salutleterojn kaj telegramojn de la Plenumkomitato de l'Asocio

Por via sanstato

KIEL INFLUAS LA ALKOHOLO

En Popola Respubliko Bulgario nuntempe reaktiviĝas la nobla movado por sobereco. La iniciatoj eliras plej parte de la junularo, precipe lernantaro, kaj de aliaj konsciencaj homoj, kiuj batalas krom kontraŭ la alkoholismo same kontraŭ aliaj malvirtoj de la homo.

En nia lando ĉe la konstruado de evoluanta socialisma socio nia Popola Registaro mem per leĝoj kaj diversaj ordonoj limigas la alkoholuzadon. Ĉar

de Bulgaraj Filatelistoj, de la Redakcio de „Filatela Revuo“ k. a.

En la nomo de la esperantistoj la jubileulon salutis la E-veterano Ivan Vasilev.

K-do Leviĉarov dankis pro la esprimita al li atento kaj rakontis interesajn epizodojn el s'a pli ol duonjarcenta agado kiel filatelisto kaj esperantisto. Li substrekis, ke Esperanto tre bone helpis lin krei multnombrajn kontaktojn kun eksterlandaj esperantistoj kaj filatelistoj.

La celebros de k-do Leviĉarov estis bela festo por esperantistoj kaj filatelistoj en Pazarĝik.

D-ro Georgi Penev

De kiam datas la poŝtkarto?

La poŝtkarto estas uzata multe pli malfrue ol la enkonduko de la poŝtmarko kiel taksa signo. La unuaj poŝtkartoj estis uzitaj unue de la aŭstria poŝtadministracio en 1839 kaj post ili en 1872 de la francaj poŝtoŭficejoj. Pritaksante la praktikecon de tiu ĉi poŝtservo kaj la altigitan intereson de la publiko al ĝi, ankaŭ la ceteraj ŝtatoj komencis enkonduki ĝin. Iuj eldonoj de la francaj poŝtkartoj estis interesaj per tio, ke sur ilia fronta flanko oni presis komercajn reklamojn de privataj firmoj. Tio liveris al la franca buĝeto sufiĉe grandajn enspezojn.

Unu el la indikoj pri la kulturo de iu popolo, do ankaŭ pri la kulturo de la individuo, estas la nombro de la sendataj kaj ricevataj leteroj. Laŭ statistikaj informoj Francio tiurilate havas rekordon. Meznombro parizano poŝte sendas pli ol 300 leterojn kaj poŝtkartojn kaj verŝajne tioman kvanton ricevas. Sekve parizano ĉiutage trovas en sia poŝtkesto almenaŭ unu leteron aŭ karton.

Sciigas: L. Leviĉarov

kiam la Ministerio de Popola Sanprotekto elspezas neimageblajn sumojn por novaj hospitaloj, dispansarioj k. a. por restarigi la sanon de veraj malsanuloj, estas nepardoninde favori drinkekulojn suferantajn pro sia propra malforta volo. Sed estas necesa ankaŭ amasa kleriga agado flanke de la sociaj organizaĵoj, ĉar la batalo por la homa sano estas malfacila.

La medicinistoj devas alte aprezi la

movadon por sobreco kaj el scienca vidpunkto kontribui por ĝia sukceso.

Trapasinte la limon de modera alkoholtrinkado, la homo atingas staton de alkohola veneniĝo.

Tial la medicino distingas akutan kaj kronikan veneniĝon. Ĉe la akuta unue altiĝas la humoro, estiĝas psika ekscito, la pulsado plifortiĝas kaj la vizaĝo fariĝas ruĝa pro larĝiĝo de la pereferiaj sangvazoj. Tio estas la unua stadio de veneniĝo.

Dum la dua stadio estiĝas spirita subpremo kaj perdo de la konscio, plilarĝiĝo de la pupiloj, la spirado implikiĝas kaj la vizaĝo bluiĝas. La kora kaj pulma funkcioj malfortiĝas kaj finfine venas la morto.

Tie variaj estas la simptomoj de la kronika alkoholismo. Post longa kaj ofta uzado de alkoholaĵoj (biero, vino, brando, konjako k. a.) inflamigas la spiraj kaj digestaj vojoj, komencante per laringito kaj faringito. Aliaj postsekvoj de l'uzado de alkoholaj koncentraĵoj estas la kronika gastrito, kiam la mukmembrano de la stomako koro-das kaj fariĝas netaŭga plenumi sian tiel gravan funkcion. Tiamaniere estiĝas la stomakaj ulceroj, kiuj pli poste povas degeneri je kancero.

Plue difektiĝas la koro — motoro de la rondirado de la sango. La diversaj alkoholaj trinkaĵoj influas malbone la funkcion de la koro. Iuj de la drinkemuloj konsumas abundan nutraĵon, multaj de ili estas ordinaraj fumantoj, aliaj fordonas sin al malbonmora vivo kaj malĉasteco. Plej minacataj estas tiuj, kiuj jam havas malsanan koron, sed principe multaj homoj malsaniĝas kore nur pro trouzo de alkoholaĵoj. La biertrinkuloj povas ricevi grandigintan, tiel nomatan „bierkoron“, kiu malbone funkcias. Aliaj komplikoj pro alkoholizado estas hipertensio, arteriosklerozo speciale de la renoj, emo al apopleksio. Ofte la malsana koro estas ligita kun cirozo de la hepato kaj ŝvelo de la lieno. De hepata cirozo

malsaniĝas, laŭ la statistiko, ĉiu kvara drinkulo. Tiam la hepato grandiĝas, fariĝas plata kaj ĝia histo degeneras je 40% en grason anstataŭ 3—5% normale. La hepato estas glando, kiu produktas pli ol 40 specojn de vivnecesaj suktoj kaj tial plenumas tre gravan funkcion en la homa organismo. La suferantoj de tiu malsano ricevas ikteron, la ventro ŝvelas kaj post kelka tempo en ĝi komencas kolektiĝi akvo — la tiel nomata ascito. La spirado kaj rondirado de la sango estas malhelpataj, de tago al tago la organismo malfortiĝas kaj post unu du jaroj la morto venas.

Postsekvo de la alkoholizado estas ankoraŭ la inflamo de la nervoj — la tiel nomataj nevritoj. Oni sentas dolorojn en la muskoloj de la gamboj kaj pli malofte en la brakoj. La malsanuloj facile laciĝas, la kruroj ŝvelas kaj la malsaniĝo povas progresi je paralizo. Alian fojon tio kunligiĝas kun kora difekto, aperas pli ofta pulsado kaj sufoko. Povas okazi paralizo de la okulaj muskoloj. La sufero estas daŭra kaj povas finiĝi per morto. Tiaj nervaj malsaniĝoj povas esti iskiadiko, difektita vidpovo, ofte meningito kaj cerbaj sangelfluoj.

La drinkado ofte esprimas nenormalan psikan staton kaj dependas de manko de volo kontraŭstari al la tento ebriiĝi. Psikaj postsekvoj estas la malaltiĝo de la psikaj fortoj ĝis plena stultiĝo, epilepsio, veraj psikozoj kaj progresiva paralizo. Sed plej grava psika difekto estas la malsano „delirium tremens“. Ĉe ĝi la malsanuloj suferas de halucinoj. Ili sentas sin minacataj de nigraj homoj kaj bestoj (ratoj ekzemple), aŭdas voĉojn ktp.

La alkoholismo de la gepatroj malutilas ankaŭ la generacion. La infanoj de drinkuloj inkliniĝas al nervaj kaj psikaj malsanoj.

La drinkado ĝenerale detruas la familion kaj granda parto de la eksedziĝoj estas sekvo de l'alkoholismo.



La alkoholuloj ne rezistas kontraŭ infektaj malsanoj kaj pneŭmonio.

La alkoholo estas malamiko de la personeco. La drinkulo ne plu povas akcepti ĉion gravan el la vivo kaj kulturo, lia konscienco limiĝas. Li konsideras kaj rezonas senpripense, ne profundigante, facile ekecitigas kaj ofte senbaze konfliktas kun la proksimuloj, fariĝas batalema kaj parolas nelogike. Kvante lia laboro jam ne estas sufiĉa, des pli kvalite. La drinkulo rompas siajn ligojn kun la socio kaj restas nur en la ĉirkaŭo de homoj, ŝatantaj kiel li la drinkadon.

La alkoholo sklavigas la homon, kaj li ne povas kontraŭbatali en la vivo. Tia homo neglektas ĉiun devon al edzino kaj infanoj, al popolo kaj kulturo, al si mem kaj al sia homa digno.

Konante la malutilan influon de l'alkoholo al la fizika kaj psika sanstatoj de la homoj, ĉiu konscia individuo kaj la tuta socio devas batali por sobereco. Sed plej bona agitado tiurilate estas la persona ekzemplo.

D-ro Boris Nedkov

AKTIVECO DE MEDICINISTOJ

Dum la lasta tempo la medicinistoj ekaktivis. Kvankam dum universalaj kongresoj de Esperanto la nombro de partoprenantoj en la faka kunveno de Universala Medicina Esperanta Asocio ne estis multnombra, la oficiala „Medicina Internacia Revuo“ aperis preskaŭ regule dufoje dum la jaro. Ĝi estas redaktata de prof. Suzuki el Fiziologia Instituto „Tiba“ — Japanio, kaj de d-ro Shinoda, prezidanto de UMEA, Yamagata, Japanujo. Sen la granda oferemo de ambaŭ japanaj kuracistoj la revuo kun longjara tradicio jam malaperus kaj estus forgesita. Plej penan laboron faris d-ro André Albault, akademiano, franca oftalmologo el Toulouse. Li prilaboris la specialan medicinan terminologion por la Plena Ilustrita Vortaro kaj ĝi estiĝis tiamaniere bazo por ĉiu estanta laboro de medicinistoj.

La mankon de pli ofte eldonata medicina informilo klopodas forigi la ĉeĥoslovakaj kuracistoj-esperantistoj. Dum la kvar lastaj jaroj ili eldonas informojn, bedaŭrinde, plejparte nur ciklostilite presitajn. La modesta bulteno nomiĝas „Medicinistaj Informoj“. La Ĉeĥa Esperanto-Asocio komprenis la signifon de tiu ĉi bulteno kaj ekde la 1 de januaro 1972 transprenis ĝian eldonadon. Oni sukcesis starigi firman reton de perantoj, precipe en Sovetunio, Hungario, Pollando, Francio, Bulgario k. a. Pasintjare regule la 1-an de ĉiu dua monato la bulteno aperis dense skribita kun

abunda, ĉefe refera materialo en 6—8 paĝoj. La prezo estas 20 kĉs poŝtare (aŭ egalvaloro — 2 us. dol., 2 rbl. aŭ 10 internaciaj respond-kuponoj). Eldonkvanto: 350 ekz. La bulteno havas apartan rubrikon por flegistoj kaj alia parencaj profesioj.

Jen kelkaj titoloj de artikoloj en la lastj: n-ro 4/1972 dissendita fine de aprilo ĉ. j. a D'abeta mikroangiopatio — Efiko de propanalo — Aktiveco de fermentoj kaj skizofrenio — Akuta fermiĝo de mezenteria arterio — Malignaj tumoroj ĉe novnaskitoj — Karcinomo de haŭto kuracata per ingvento — Eksperimentaj studoj de glukokortikoidoj sur ratoj — Observo de adhesiemo de trombocitoj — Malkovro de tromboj en maldekstra antaŭkamero — Akuta pankreatito dum infekta hepatito — Praktika konsilo: Halto de korago — Diagnozo de cerba aterosklerozo — Patogenezo de la hemofilio — Bovina lakto kaj koronariaj malsanoj — Por flegistinoj: Kiel plue en la kuracado de rena malsufiĉeco — Reklamoj de kuraciloj k. a.


Ni atentigas pri konvena varbado de medicinistoj por Esperanto per la nomitaj esperantistaj fakaj bultenoj. Adreso de la eldonanto de „Medicinistaj Informoj“: *Ĉeĥa Esperanto-Asocio, poŝtkesto 8, 120 21 Praha 2. Redaktas: d-ro Josef Hradil, Ĉesky, Dub, okr. Liberec, ĈSSR.*

Petu senpagan varbnumeron!

Abonu „Bulgaran Esperantiston“ por 1974 j.! Abonigu viajn amikojn, konatojn, kursanojn! Abonigu viajn eksterlandajn korespondamikojn! Lasta limtempo per la Poŝto: la 10 de decembro!

El la parolado de prof. J. DAGYS ĉe la jubilea celebrego de d-ro Poška

Antanas Poška naskiĝis en 1903 j. en vilaĝo Grypkeliai, Pasvalys-regiono. Esperanton



li lernis en mezlernejo laŭ literaturaj fontoj. La Internacia Lingvo imponis lin kiel rimedo utila ankaŭ por vojaĝoj al fremdaj landoj. Fininte gimnazion li veturis al Kaŭnas kaj studis medicinon en la Litova Universitato dum 1926/29. En Kaŭnas tiam estis forta kaj multnombra E-movado, organizita en Litova Esperanto-Asocio. Ĉi eldonis monatan revuon „Litova Stelo“.

Nelonge post sia alveno en Kaŭnas Poška fariĝis gvidanta persono de la loka E-movado. Li ricevis permeson paroli pri Esperanto kaj en Esperanto ankaŭ per la Litova Radiofono en Kaŭnas. En la programo de la radioelsendoj estis regule E-anguletoj, kiujn gvidis la juna Poška. Por E-kursoj li preparis en 1929 E-ĉeksilon (reeldonitan en 1969). Siajn studojn de medicino tamen li ne finis kaj ne fariĝis kuracisto. Lin allogis turismo kaj etnografio.

En 1929 j. Poška entreprenis kun la ĵurnalisto Matas Šalčius grandan vojaĝon ĉirkaŭ la mondo per motorbiklo. Ili ambaŭ travojaĝis Germanion, Ĉeĥoslovakion, Aŭstrion, Hungarion, Jugoslavion, Bulgarien, Grekion, Egipton, Palestinon, Sirion, Irakon, Iranon. Dum tiuj vojaĝoj Poška ĉiam renkontiĝis kun esperantistoj, prelegis en Esperanto kaj multfoje ricevis ne nur moralan, sed ankaŭ materialan helpon de eksterlandaj esperantistoj.

En Teherano li malsaniĝis kaj disiĝis kun M. Šalčius. Dum sia malsano li estis flegata de la lokaj esperantistoj. Kiam resaniĝis kaj adiaŭante demandis, per kio li povas rekompenci ilin, tiuj respondis: „Jes, vi estas ŝuldanta, sed tiun ŝuldon vi redonos ne al ni, sed al iu alia, kiun trafos simila malfeliĉo. Ni faris nian devon“.

El Irano post sia resaniĝo Poška vojaĝis al Hindujo. Ricevinte de la Kleriga Ministerio de Litovio stipendion por perfektigo en antropologio, li studis en la Universitato de Bombajo kelkajn jarojn. Fininte ĝin li ricevis sciencan gradon de doktoro. Poste (1933—1936) li partoprenis diversajn antropologiajn ekspediciojn en Norda Hindujo, Himalaja Montaro, Birmo, sur Andamanoj kaj Nikobaraĵ Insuloj. Kolektis kranimetriajn materialojn de tie loĝantaj popoloj. Poška ne kontentiĝis nur pri antropologiaj esploroj, sed samtempe studis la etnografion de tiuj popoloj: iliajn lingvojn, morojn kaj kutimojn. El tiuj esploroj evidentiĝas, ke en Norda Hindujo loĝas tiaj gentoj, kies lingvo tre similas la litovan. Do, tiuj popoloj en profunda pasinteco estis najbaroj de niaj praaŭoj kaj interrilitis kun ili.

En Hindujo Poška konatiĝis kun la eminenta hinda verkisto R. Tagore kaj tradukis kelkajn verkojn de li en litovan lingvon. Li renkontiĝis ankaŭ kun la hinda gvidanto Mahatma Gandhi kaj interrilitis kun li.

En 1936 j. Poška komencis returnan vojon al sia patrujo. Li vojaĝis tra Afganiŝtano, Irano, Kjurdistano, Turkio kaj Bulgario. En Bulgario li restis pli longan tempon, vizitis kelkajn urbojn, kie interrilitis kun lokaj esperantistoj, faris multajn prelegojn pri siaj vojaĝimpresoj kaj pri la esploroj en Hindujo. Li vizitis ankaŭ tiujn lokojn, kie en XIX jc loĝis kaj laboris la veterano de litova renesanco d-ro Jonas Basanavičius. Poška kolektis rememorojn de lokaj maljunuloj pri Basanavičius.

Reveninte en la patrujon en 1937 j. li komencis priskribi siajn vojaĝimpresojn en litova lingvo kaj pretigis du volumojn, kiuj estis eldonitaj en 1939—1940. Tio estis nur la vojaĝimpresoj. Pro la milito la cetera materialo ne aperis kaj troviĝas ankoraŭ en manuskriptoj.

En la komenco de la soveta periodo A. Poška laboris en Vilnius kiel direktoro de publika biblioteko. Post la Dua Mondmilito li trafis en Azion, laboris en diversaj landesploaj muzeoj de sovetaĵ mezaziaj respublikoj. Li partoprenis ankaŭ kelkajn arkeologiajn kaj kompleksajn esplor-ekspediciojn en Kirgizia kaj Taĝika SSR. Pri tiu periodo de lia laboro estas eldonita litovlingva libreto „Kaverno de aglo“.

En 1961 j. A. Poška kun prof. T. Ivanaŭskas entreprenis esploran vojaĝon tra Taĝikio. vizitis la naturan rezervejon „Tigrovaja Balka“, surgrimpis Pamiran Montaron kaj aliajn lokojn. interesajn por biologiaj esploroj, kie regas sovaĝa naturo, malofte tuŝata de la homa kulturo,

La lastajn 12 jarojn Poška loĝas en Litovio kaj okupiĝas pri etnografiaj kaj historiaj



esploroj de kelkaj landaj regionoj, farante privatajn ekskursojn al interesaj lokoj dum somero.

Li multe verkas. Lastatempe, en 1970, li pretpigis manuskriptojn pri diversaj popoloj sub titolo „Ni ĉiuj estas fratoj“. La verko estas originale verkita esperantlingve, sed ankoraŭ ne trovis eldoniston.

ESPERANTO EN LENINGRADAJ ALMANAKOJ

La dumonata buŝa Almanako de novaj tradukoj „Unuafaje en rusa lingvo,“ kiun organizas la sekcio de arta tradukado ĉe la Domo de Verkistoj en Leningrado, estas tre populara en la urbo. Ĉefredaktoro de la Almanako estas la bone konata en mondaj tradukistaj rondoj prof. E. S. Etkind. En la Almanakoj estas prezentataj unuaj ruslingvaj tradukoj de la plej famaj verkoj de klasikaj kaj modernaj aŭtoroj.

Fine de majo ĉ. j. la vica 54-a numero de la Almanako estis dediĉita al la temo „Esperanto kaj la arta tradukado“. Tiu ĉi grava evento, okazinta unuafaje en la multjara historio de la Almanakoj, efektiviĝis dank' al sindona laboro de la juna instruistino kaj E-tradukistino D. Lukjanec.

En la programo de la Almanako estis pli ol duonhora enkonduka parolo, kiun faris docento S. N. Podkaminer, konata leningrada esperantisto. Li koncize rakontis al la publiko pri la lingvo, pri ĝiaj avantaĝoj kaj pri ĝia uzo por literatura tradukado. S. N. Podkaminer ankaŭ suplementis sian rakonton per prezento de libroj eldonitaj esperantlingve en multaj landoj.

Sekvis parolado de esperantisto el Moskvo — V. V. Samodaj, filologo-arabisto, redaktoro de la araba eldono de la gazeto „Moskvaj Novaĵoj“. Li citis multajn verkojn de famaj rusaj poetoj, tradukitajn en Esperanto. Fine V. V. Samodaj kaj S. N. Podkaminer respondis al multnombraj demandoj de la aŭskultantoj.

La redakcio de la Almanako taksas la okazintan Esperanto-programon kiel tre interesan kaj utilan kaj havas intencon enprogramigi novajn manifestiĝojn de esperantistoj en la sekvantaj Almanakoj.

Mikaelo Bronŝtejn

KAUNASAJ ESPERANTISTOJ AKTIVAS

En urbo Kaunas, Litovio, la Esperanto-Klubo, gvidata de la tre aktiva esperantisto Albinas Vebeliunas, bone laboras. La kl. banoj kolektiĝas ĉiumerkrede kaj pridiskutas agadprogramojn, legas referaĵojn, librojn, revuojn, ekzerciĝas kaj perfektigas en la lingvo. Ili multe abonas E-gazetojn kaj ĵurnalojn.

En majo ĉi-jare finiĝis la E-kurso, kiun

Ĝis nun A. Poška estas fervora esperantisto. Kelkajn jarojn (de 1961 ĝis 1969) li estis prezidanto de la vilniusa Esperanto-klubo, prezentis al ni multajn prelegojn pri etnografio kaj kulturo de tiuj landoj, kiujn li vizitis dum siaj vojaĝoj.

Prof. J. DAGYS

gvidis la agema instruistino Baltrušiene. La kursanoj plantis en la Parko de Kulturo kaj Ripozo, ĉe la kursejo, verdan kverketon. Sub la radikojn de tiu arbeto ili enfosis botelon, en kiun ili metis akto-atestilon pri tiu ĉi okazaĵo. Samtage en tiu ĉi parko ili mem aranĝis E-koncerton, kiun ĉeestis multnombra esperantista publiko, malgraŭ la malfavora vetero.

La 3-an de junio en la Vitaŭtas-Parko de Kulturo kaj Ripozo la kursanoj aranĝis por neesperantistoj duan E-koncerton sub titolo „Tiel sonas la litovaj kantoj en Esperanto“. Ĉeestis ĉirkaŭ 600 personoj diversagaj. La instruistino Baltrušiene faris prelegon pri Esperanto. Post tio la gekursanoj plenumis E-kantojn. La publiko multe aplaudis. Ĉi tiun koncerton gvidis la kursanino Grinkevičiute. Ŝi ne nur kantis, sed ankaŭ muzikis per kanklo (litova muzikilo).

Post serioza laboro oni bezonis ankaŭ amuziĝi. Tiel la gekursanoj kun sia kursgvidantino kaj multaj esperantistoj venis en la belan kverkarbaron. Ĉi tie ili gaje ludis, dancis, kantis en Esperanto.

Satamuzinte sin ĝis malfrua vespero ili gajaj, kun bonega humoro, disiris hejmen.

J. Pipiras

Sindone laboras por Esperanto Vladislav Versila — prezidanto de la urba E-klubo en Panevežys, Litovio. Li ĉiujare gvidas E-kursojn kaj tiamaniere plidensigas la vicojn de la esperantistoj en la urbo.

Sur la foto: grupo da kursanoj kun sia gvidanto V. Versila post fina ekzameno kaj enmanigo de atestoj. La kursanoj arde deziras korespondi kun esperantistoj el la tuta mondo. Sendante leteron, bonvolu indiki kun kiu el ili vi deziras kontakti. Komuna adreso: Sovejunio, Litovio, Panevežys, ald 67.





VIII Esperanto-kurso de la kulturdomo de Ĥmelnickij, USSR

La 1-a vico (sidas) de maldekstre:

1. Ivan Krutikov, inĝeniero-vojkonstruisto 75-jara; 2. Andreo Rogov, instruisto de Esperanto, prezidanto de la E-klubo, 59-jara; 3. Ŝarova Anna, ekonomistino, 28-jara kurs-estrino; 4. Pajonk Bronislav (polo), laboristo-organisto, 28-jara.

La 2-a vico (staras) de maldekstre:

1. Gara Vladimir, laboristo-tornisto, 28-jara; 2. Uŝickaja Sofija, instruistino de angla lingvo, 23-jara; 3. Bobjer Maria, inĝenierino-geocizistino, 32-jara kun filineto; 4. Bobjer Nataŝa, 8-jara lernantino, denaska esperantistino; 5. Primak Natalia, laboristino-muntistino, 19-jara; 6. Kuvta Oleg, 16-jara lernanto en urbeto „Ĉernij Ostrov“; 7. Fedčenko Ljubov, rad.oteknikistino, 20-jara.

La 3-a vico (staras) de maldekstre:

1. Stojanovskaja Tamara, kuracistino, 59-jara, „panjo“ de nia E-klubo; 2. Primak Grigorij, laboristo-instrumentalisto, 23-jara; 3. Kovalčuk Jurij, laboristo-sekuristo, 18-jara; 4. Kanevskij Aleksandr, inĝeniero, 24-jara; 5. Babičuk Vasilij, 17-jara, lernanto-poligloto; 6. Zakotjanskij Valerij, 17-jara, lernanto (ambaŭ el urbeto Ĉernij Ostrov).

Komuna adreso: USSR, 280 000 Ĥmelnickij, str. 25 (kioĉro 43, Kulturdomo, Esperanto-klubo.



Ĝoje manifestacias la Esperanto-klaso de la instruistino Penka Kateva el la Ekonomia Teknikumo de Veliko Târnovo je la granda festo de la bulgara popolo — La tago de la bulgara klerigo kaj kulturo, de la tutslava skribo kaj la bulgara gazetaro (la 24-a de majo).

POR LA MALGRANDA ESPERANTISTO

LA MALGRANDA PETRO

Foje pro malatento Petro rompis vitrinon de magazeno. Vidinte la malfeliĉon, li ege ektimis kaj rapide forkuris kiel sago.

Tamen la vendisto rimarkis ĉion ĝustatempe kaj ekkuris tuj post la knabon. Kiam li atingis Petron kaj kaptis lin je la kolo, li diris minace:

— Ĉu vi ne scias, ke vi devas pagi la rompitajn vitron?

— Nature, — rediris Petro, — ja mi kuris hejmen por preni monon...

*

La malgranda Petro staras kun sia patro ĉe la bordo de rivero kaj diras:

— Paĉjo, mi volas bani min en la rivero... Ĉu vi permesas?

— Ne, Peĉjo, la akvo estas malvarma.

— Sed mi banos min vestita...

*

Venis hejmen gastoj. Onklo Ivan donis ĉokoladon al la malgranda Petro, sed tiu forgesis danki. Tiam lia patrino demandis lin mallaŭte:

— Kion vi devas diri, Peĉjo?

Sed Petro respondis laŭtvoĉe:

— Onklo Ivan, donu al mi ankoraŭ unu ĉokoladon!

*

Petro, jam lernanto en la unua klaso, kunportis hejmen kornikon. Tion vidis lia patrino kaj demandis lin:

— Kial vi kunportas tiun kornikon? Kion vi faros al ĝi?


— Mi volas vidi, ĉu vere ĝi vivos tricent jarojn, — respondis Petro.

El germana: M. Băceș



KRUCVORTENIGMO

- 1—2. La plej grava homa organo, konsiderata kiel sidejo de la sentoj (radiko).
- 2—3. Homaspekta aŭtomato, kapabla obei certajn ordonojn kaj fari komplikajn taskojn (rad.).
- 3—4. Aroma trinkaĵo preparata el folioj.
- 5—6. Suferi pro bedaŭro kaj redeziro al io perdita (rad.).
- 6—7. Ŝtatano de la plej multnombra respubliko de Sovetunio (rad.).
- 7—8. Murmuro de torento (rad.).
- 9—10. Elokvente parolanta homo (rad.).
- 10—11. Resti dum kelka tempo nenion farante por refreŝigi siajn fortojn (imperativo).
- 12—13. Granda publika kunveno kun politika celo (rad.).
- 13—14. Plej rapide rajdi.
- 15—16. Malfacile komprenebla.
- 16—17. Aroma, sukoplenta tropika frukto (rad.).
- 18—19. Duondiametro (rad.).
- 19—20. Io, kio restas aŭ devas resti kaŝita kaj ne de ĉiu ajn konata (rad.).
- 21—22. Altaĵo apud la urbo de la 58-a Universala kongreso de Esperanto.
- 23—24. Mondfama ĉemara ripozurbo kaj haveno de Bulgario.
- 25—26. Arbeti el familio oleacoj, kun bonodoraj floroj.
- 26—27. Havanta altajn kaj malvulgarajn moralajn kvalitojn (pluralo).
- 28—29. Komenci batalon kontraŭ malamiko.
- 29—30. Mahometana doktrino kaj religio (rad.).
- 31—32. Parto de teatraĵo, kiu anoncas kaj preparas la agon (rad.).
- 32—33. Placa pro facilaj kaj harmoniaj movoj (adverbo).
- 34—35. Okupo, profesio, konsistanta en plenumo de publika aŭ privata servado.
- 35—36. Kiu havas kvaliton de oro.
- 36—37. La t. n. „nigra“ kontinento (rad.).
- 38—39. Altestimo, granda respekto (adjektivo).
- 39—40. Esti ravita per ia beleco aŭ supereco (imperativo).
- 41—42. Tute ŝirmita kontraŭ infekta malsano.
- 43—44. La kemia elemento Te (rad.).
- 45—46. Granda rivero ekfluanta de la Ladoga Lago.
- 46—47. Ĉiuspeca batalilo (rad.).
- 47—48. Multekosta, pompa brileco en la vivmaniero (rad.).
- 49—50. Restadi senmova, senaga, malaktiva (adjektivo).
- 50—51. Sameco de sentoj aŭ opinioj inter pluraj personoj.
- 52—53. Havenurbo en Maroko ĉe la Atlantika oceano.



- 53—54. Kurba, fermita linio, kies ĉiuj punktoj estas en egala distanco de interna meza punkto nomata centro (pluralo)
55—56. Muzika teatraĵo.
56—57. Akvoamasoj, kiuj leviĝas kaj refalas ĉe supraĵo de maro aŭ lago.

Atentu la donitajn helpe vokalojn!
Post korekta solvo de la enigmo
vi ricevos la nomon de grava aranĝo
de la Instruista Sekcio de Bulgara
E-Asocio.

La enigmon donas Marin Băceș

PAPULANDO—NOVGVINEO

La unuan de decembro 1973 la aŭstralia registaro oficiale deklaras, ke Papulando—Novgvineo estas lando memrega. Tiu lando havas loĝantaron de proksimume 2,5 milionoj, disvastigitan sur 465 000 km² — preskaŭ duoble la grandeco de Britujo.

La loĝantaro estas de origino melanezia. Tamen ekzistas multaj diversaj triboj kaj ĉirkaŭ 700 lingvoj — veraj lingvoj, ne dialektoj. Dek elcentoj de la loĝantaro scipovas la anglan lingvon, dum eble 50 elcentoj parolas piginon, kiu estas miksaĵo de la angla kaj la germana kun iom da nederlanda kaj kelkaj melaneziaj vortoj.

Piĝino estas facile lernebla kaj tre esprimriĉa. Fakte, kelkaj el la junuloj jam verkas poezion piĝine. Alia grava papua lingvo, vere indiĝena, estas tiu, kiun oni nomas „motu“. En la parlamentejo oni uzas la tri lingvojn — anglan, piĝinon kaj „motu“ — kaj oni jam havas simltanan tradukadon.

Unesco Features kaj Informa Servo de UEA,
(n-ro 62/1973)

Redakta Komitato : Kunĉo VÂLEV (ĉefredaktoro), Marin BÂCEV, Bojka BATALSKA
Asen GRIGOROV, Nenko JONKOV, Krâstju KARUCIN, Ivan SARAFOV, Angel TODOROV,
Stefka HRISTOVA.

Korektis: Vasja Petrova

Sofio, poštkesto 66

Tel. 83-26-82

DEZIRAS KORESPONDI

Bulgario

Novaj entuziasmaj geesperantistoj 18-25-jaraj deziras interesanĝi bk kaj gramofondiskojn tutmonde. Komuna adreso: *Bulgario, Sofio 70, Mladeŝka Palata*. Elektu inter la nomoj:

Spaska Doneva Nikolova — 20-jara;
Bogdana Seferinova Ivanova — 24-jara;
Ljuben Stanimirov Hubenov — 25-jara;
Ivan Sotirov — 19-jara;
Tinka Jordanova — 22-jara;
Maria Dimitrova Georgieva — 22-jara.

Ĉeĥoslovakio

Beranova Marie — 43531 *Ĉeske Kopisty 95, o. Litomeŝice* (19-j.-kun ĉl pri lingvoj, literaturo, alpinismo).

Ĉapkova Anna — 73921 *Paskov*, ul. Nar. odboje 322 (26-j. — kun ĉl pri ĉt.).

Zatloukalova Hana — 15000 *Praha*, Pod Kavalirkou 42 (25-j. kun ĉl pri literaturo, filmoj, teatro, muziko, insignoj, pm.).

Strelba Antonin — 47001 *Ĉeska Lipa*, A. Sovy 1700, (60-j. kompostisto — pri numizmatiko).

Tvrđik Josef — 39601 *Humpolec*, Halkova 1027 (49-j. teknikisto kun ĉl pri ĉt.).

Lorencova Eva — 41201 *Litomeŝice*, Vrehliĉkeho 3 (20-j. studentino — pri literaturo, muziko, sporto).

Hungario

Dr. Gyulai Szombathely — Szemmelveisz u 10, *Ungarn* (kun bulgaraj instruistoj).

Josefo Hegedus, Uzsoki u. 8, *Oroshaza* (38-j. — kun ĉl pri ĉt, bk, pm).

Maria Kiss Ernőne — H 5900, *Oroshaza*, Makoi u. 21 (43j. — kun ĉl interesanĝas nur bk).

Pollando

Marula Słobadzian — Marcinkowice 5, 55-030 pocz.: Wegry, pow-woj. *Wrocław* (20-j. — kun ĉl pri kino, bk, sondiskoj, modrevuoj).

Janterene, ul. Broniewskiego 1, m. 28, 62-510 *Konin* 2 (kun ĉl — nur pri filatelo, pm).

Sovetunio

Stěpanenko Svetlana — str. 23 avgusta 6, kv 18, *Ĥarkov* 45 (18-j. studentino — kun ĉl interesanĝas bk).

Ostěpenko Aleksej — str. Karazina 12, kv. 2, *Ĥarkov* 78 (17 j. studento — interesanĝas bk).

20 geesperantistoj (komencantoj kaj progresintoj) — kun ĉl pri ĉt. Skribu al: Estonio, 202 900 *Viljandi*, str. Jakobsoni 3-2, Ants Mikk.

Liĉ Tanja — ul. Lovkova 3, kv. 68, 644 020, *Omsk*-20.

Biruŝe Ryvityte — Pozelos 40/12 — 62, *Vilnius* 232 000, Litovio (14-j. lernanto — kun ĉl pri sondiskoj, bk, muziko, revuoj).

Rimantas Lisauskas — ul. Vatanĉiŝkes, poŝto Linkmenys, dist. Ignalina, Litovio (20-j. studento en lernejo de arto — kun ĉl pri ĉt).

Virginija Valutonyte — 233 026 *Kaunas*, Tytuvėn, Litovio (18-j. — kun ĉl pri fremdaj lingvoj, medicino, arta glitado k. a.).

Petro Budakov — Ĵornovka, Modilevskaja oblast, Osipoviĉskij rajon (kun ĉl pri ĉt).

Violeta Špakauskaite, Šiaulių raj. Gruzdžiai g. Kom. Ryto 46, Litovio (17-j. lernantino — kun knabinoj el la tuta mondo en Esperanto, angla, rusa).

Sirje Sadam — 200 000 *Tallinn*, Endla 47-14, Estonio (17-j. lernanto — kun ĉl pri ĉt).

Kaia Annus — 200 016 *Tallinn*, Tiivase 46, Estonio (17-j. lernanto — kun ĉl pri muziko, turismo, insignoj, bk).

Ülle Riim — 200 023 *Tallinn*, Tammsaare tee 119-34, Estonio (18-j. abituriento — kun ĉl pri literaturo, turismo).

Mari—Ann Mätik — 200 029 *Tallinn*, Tammsaare tee 71-84, Estonio (21-j. oficistino en turisma oficejo — kun ĉl pri ĉt).

Grupo de diversaĝaj novaj esperantistoj (inĝenieroj, studentoj, laboristoj k. a.) dez. korespondi pri ĉt kun ĉl. Respondo certa. Skribu al: Litovio, *Kaunas*, Montvilos 4, Esperanto-Klubo.

Vladimir Egorov — *Novomiĉurinsk* — 391 098, Rjazanskaja oblast, GRES, dom 24, kv. 68 (12-j. lernanto — kun ĉl pri ĉt).

Venera Abdullina — *Tjumenj*-3, do vostreb什么vanija 625 003 (20-j. studentino de biologio — kun ĉl pri ĉt kolektas bk, insignojn, esperantaĵojn k. a.).

Rita Baužyte — 50-meĉio 19-34, *Mažeikiai*, 235 500 Litovio (16-j. lernantino en muziklernejo — kun samaĝuloj pri muziko, sondiskoj k. a.).

Harti Laas — *Viljandi*, str. Tartu 14-1, Estonio, (inĝeniero — kun ĉl: bk, pm, gram. diskaj k. a.).

Meeri Jürgenson — *Viljandi*, str. Leola 32, Estonio (kuracistino — kun ĉl: bk, pm, gram. diskaj k. a.).

Rein Koppel — *Viljandi* raj., Olustvere teknikum (studento — kun ĉl: bk, pm, gram. diskaj k. a.).

Tiia Janno — *Viljandi*, str. Kungla 3, Estonio (lernantino de 10-a klaso — kun ĉl: bk, pm; gram. diskaj).

Ülo Toomsalu — *Viljandi*, str. Lambitu 11-3, Estonio (lernanto en 6-a klaso — kun ĉl: bk, pm).

Valli Tomingas — *Viljandi* raj., Olustvere teknikum, Estonio (lernantino — kun ĉl: bk, pm, sondiskoj).

Studenta Esperanto-Klubo dez. korespondi kun ĉi pri ĉt. Komuna adreso: Sovetunio 625 000, *Tjumenj*-9, p. k. — 8, Esperanto-klubo.